

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD (Jugoslavio)	EL Vol. 26 n-ro 2 (112) 25.4.1975.
---	--

SPECIOJ - DUULOJ DE TRIĤINELOJ

EN KAZAĤSTANO KAJ MEZ-AZIO

(Boev S.N., Ŝaikenov B., Tazieva Z.N., ALMA-ATA, Sovetio) ^{§/}

En genro Triĥinelo Railliet, 1895, krom T.spirala Owen, 1835, estas priskribitaj 3 novaj specioj: T.nativa Britov kaj Boev, 1972. T.nelsona Britov kaj Boev, 1972 kaj T.pseŭdospirala Garkavi, 1972. Ĉiuj nomitaj specioj estas morfologie tute aŭ preskaŭ identaj, sed ili bone distingiĝas laŭ komplekso de aliaj kriterioj: genetikaj (reprodukta izoleco), zoogeografiaj, ekologiaj, mastro-parazitaj interrilatoj (Britov kaj Boev, 1972), alivorte ili estas la tipaj specioj-duuloj (Mayr, 1968).

Kelkaj aŭtoroj dubas pri la specia valideco de T.nativa kaj T.nelsona (Bessonov kaj al.; 1974; Penkova, 1974; Penkova kaj Romanenko, 1973). Tial ni entreprenis studon pri areoj de tiuj-ĉi specioj, ĉar kiel sciante areo estas unu el la kriterioj de la specio.

Tiucele ni esploris specimenojn de muskola histo ĉe 24 triĥinel-infektitaj animaloj el Kazaĥstano kaj Mez-Azio. La animaloj apartenis al 7 diversaj specioj: hundo, ŝakalo, vulpo, kato, korsako, linko kaj erinaco.

^{§/} Instituto de Zoologio en la Akademio de Sciencoj de Kazaĥa SSR, ALMA-ATA.

Por identigi triĥinelan specion ni aplikis genetikan metodikon de Britov (1971). Oni plenumas ĝin jene: muso estas infektata per unu paro de diversseksaj triĥinellaj larvoj; el tiu paro oni prenas 1 larvon el al ekzamenata muskola histo de animalo (la larvo estas signata Triĥinelo sp.) kaj la alian - el la populacio de sciata specio de triĥineloj. Tiun-ĉi eksperimenton oni ripetas trifoje (je 3 musoj) - laŭ la nombro de triĥinellaj specioj, kun kiuj oni devas identigi la parazitojn el ekzamenata animalo (krom T.pseŭdospirala, kiu facile diferencigās de la aliaj 3 specioj per sia pli malgranda dimensio). La larvoj estas perforte enigataj per gutigilo en la faringon de la muso.

Nepre necesas ankaŭ kontroli infektivecon de triĥineloj el la esplorata muskola histo. Tiucele oni paralele infektas unu muson per 1 ♂ kaj 1 ♀ de Triĥinelo sp.

La infekton de la muso ni konsideris kiel la sukcesa, se larvoj en ĝia organismo naskis idaron. Tio-ĉi signifas, ke inter ili forestis reprodukta izoleco, alivorte ili ambaŭ estis samspeciaj. Tion ni difinis laŭ rezultoj de esplorado de muskola histo ĉe la muso per digesta metodo post 30 tagoj ekde la tago de la infekto.

Por eviti influon de ebla hazardeco je rezultoj de la infektado ni efektivas ĝin laŭ la sekvanta skemo.

a) la eksperimento

Triĥinelo spirala	I ♂ x I ♀	Triĥinelo sp.	20 musoj
" "	I ♀ x I ♂	"	
Triĥinelo nativa	I ♂ x I ♀	Triĥinelo sp.	20 musoj
" "	I ♀ x I ♂	"	
Triĥinelo nelsona	I ♂ x I ♀	Triĥinelo sp.	20 musoj
" "	I ♀ x I ♂	"	

b) la kontrolo

Triĥinelo sp. I ♂ x I ♀ - 10 musoj

Finon de la eksperimentoj ĝisvivis ne ĉiuj 70 musoj, sed nur 43-45 musoj.

La rezultoj de 1 identigado estis la sekvantaj.

En Kazaĥstano ni esploris 20 animalojn el 5 naturaj zonoj de la respubliko (monta, dezerta, duondezerta, stepa kaj arbar-stepa), nome: 2 *Erinaceus auritus*, 1 *Felis lynx*, 1 *F.catus*, 4 *Canis familiaris*, 6 *Vulpes vulpes*, 6 *V.corsac*.

Ĉe ĉiuj animaloj ni trovis *F.nativa*.

En Taĝikistano ni esploris 3 *Vulpes vulpes*; unu estis kaptita en Pamiro, ĉe ĝi ni identigis *T.nativa*, kaj du - en la valo inter Vaĥŝa kaj Kara-Tegina montoĉenoj; ĉe ili ni trovis *T.nelsona*.

En Turkmenio estis esplorita 1 *canis aureus* el la sabla dezerto Kara-kum, ĉe ĝi ni identigis *T.nelsona*.

Niaj esploroj permesas fari la jenajn konkludojn.

1) Por naturaj biocenoj de Kazaĥstano estas specifa nur *T.nativa*; por Mez-Azio - *T.nativa* kaj *T.nelsona*; ni ne trovis ĉi-tie *T.spirala*.

2) Mez-Azio estas evidente la norda limo de afrika specio *T.nelsona*;

3) La metodiko de Britov estas tre labor- kaj temporaba kaj ĝi postulas grandan kvanton da musoj. Tamen oni bezonas apliki ĝin por difini areojn de la apartaj specioj de triĥineloj kaj por akumuli materialojn pri specia konsisto de triĥineloj en diversaj regionoj de la mondo; tio-ĉi estas necesa por kompreni signifon de la apartaj specioj en patologio de la homo kaj en epizootologio (epidemiologio) de triĥinelozo.

BIBLIOGRAFIO

Bessonov A.S., Pen'kova R.A., Uspensky A.V., Belozherov S.N.
On the self-dependent position of *Trichinella* species. Third
Intern. Congress of parasitology, 25-31/VIII-1974, 662-664.

Britov V.A. K voprosu ĥarakteristiki varietetov triĥinel.
Tr. D-V. nauĉno-issled. vet. in-ta, t.V, vyp.2, I47-I50

Britov V.A., Boev S.N. Taksonomiĉeskij rang triĥinell raz-
liĉnyh ŝtammov i ĥarakter iĥ cirkulacii. "Vestnik AN Kazach.SSR,
n 4, Alma-Ata, 27-32, 1972

Mayr E. Zoologiĉeskij vid i evolucia. M., Izd., "Mir", 42-61,
1968

Penkova R.A. Identifikacia vidov triĥinell metodom mikro-
precipitacii na ĵivyh liĉinkah. Bull. VIGIS, N I3:80-85, 1974

Penkova R.A., Romanenko L.N. Izuĉenie ĥromosom triĥinell.
Tr. VIGIS, t.XX, Moskvo: I33-I42, 1973

GLOSARO

- biocenozo - Kunvivantaro de animaloj kaj plantoj ligitaj je
la samaj vivkondiĉoj
- korsaco = *Vulpes corsac*
- populacio - teritorie limigita tuteco de samspeciaj organismoj
- triĥinelo = triĥino

Nota: Railliet (1895), sekvante regulon de Internacia zoo-
logia nomenklaturu, proponis nomon "triĥinelo" por la ronda pa-
razita vermo anstataŭ "triĥino" ĉar la lasta estis pli frue
proponita por la insekto.